starto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1972 2

En Praha solene kulminis la kampanjo

# ĈS. ESPERANTISTOJ AL LA BATALANTA VJETNAMIO

La Vjetnama Kultura kaj Informa Centro en Praha, la 29an de februaro 1972 je la 10a horo... La reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Esperantista Klubo en Praha kaj 23 infanoj de la 1-a klaso de elementa lernejo je la nomo de Interbrigado en Praha-Bubeneč kun sia instruistino s-ino Juřenová, kiujn bonvenigas direktoro de la centro, kamarado Pham Duong, membro de la diplomatia korpuso de VDR en Praha.

En tiu ĉi momento kulminis la kampanjo proklamita la lastan novembron de la porpaca sekcio de ĈEA okaze de la 15a datreveno de la fondiĝo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj helpe al la batalanta vjetnama kaj la aliaj popoloj de Hindoĉinio. La esperantistoj venis transdoni ties rezultojn en la manojn de la vjetnamaj fratoj.

Per enkondukaj vortoj salutis la ĉeestantojn vicprezidanto de ĈEA, inĝ. František Sviták. Poste parolis Tomáš Balda, portanto de la Ĉs. Pacpremio kaj ĉeforganizanto de la kampanjo. Li koncize prezentis la rezultojn atingitajn :



Parolas Tomáš Balda. Dekstre k-do Pham Duong

En la kampanjo partoprenis entute 86 esperantistaj kaj 72 neesperantistaj organizaĵoj, ekzemple junularaj, virinaj, sindikataj kaj aliaj, plue 69 diversaj lernejoj, 27 naciaj komitatoj, kulturaj centroj, bibliotekoj kaj muzeoj. Ili sume okazigis 237 prelegojn, ekspozicioјn, filmprezentadojn, radioelsendojn ks. Kolektiĝis ankaŭ materialaj rimedoj : 22 000 paperfolioj kaj fare de la lernejanoj 3 070 kajeroj por la vjetnamaj lernantoj. /En Radotín ekzemple oni akiris ilin kolektinte kaj vendinte diversajn krudmaterialojn/. Infanludiloj kaj aliaj akcesoraĵoj por 2 625 Kčs. Kaj 18 530 Kčs kolektitaj aparte. La tuta kampanjo tamen ankoraŭ daŭras.

Transdonante la dokumenton al k-do Pham Duong T. Balda diris : "Estu ĝi dokumento de la granda amo de nia popolo al via lando".

Kamarado Pham Duong esprimis en la nomo de Kultura kaj Informa Centro kaj de la ambasado de VDR sian profundan dankon pro la helpo, kiu, laŭ liaj vortoj, estas pruvo pri la efektivaj rilatoj inter niaj popoloj, kaj kontribuas al la justa afero

de la vjetnama popolo batalanta kontraŭ la usona agreso.
"Esperantistoj",li diris, "laboras por la paco - tiu ĉi nia komuna lingvo - per sia interkomprenilo Esperanto".

Post amika regalo oni projekciis al la infanaro mallongan filmon pri la vjetnama infanĝardeno.

Jen kelkaj faktoj, per kiuj ankaŭ esperantistoj metis sian brikon al la tuthomara solidaro por helpi venki la agresantojn en la vjetnama lando.
Kvankam ne ĉie kaj ne ĉiuj eluzis la okazon je unu fojo, necesas diri, ke tiu eblecco daŭre ekzistas por esti eluzita i a m a j n. Ĝi estas precipa ŝanco por gajni altan reputacion por la Internacia Lingvo.

(knl)

# Omaĝe al la eventoplenaj tagoj...

Jam la duan fojon ĉeestos nia anaro la eksterordinare solenan momenton en la vivekzisto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio post 1969. La unuan fojon ĝi okazos en la memorindaj tagoj de la naciliberiga festo.

La II-a kongreso de ĈEA kaj la 27-a datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de l'Soveta Armeo estos do okazo por manifesti, ke la esperantista movado ne volas kaj samtempe ne povas esti apartigita de la eventoplenaj okazaĵoj en nia patrujo, sed ĝi strebas pravigi sian pluan ekzistadon en intima ligo kaj akorde kun la enlanda politika kaj socia vivo.

La 1-a kaj la 9-a de majo estas unikaj simboloj de solidareco kun ĉiuj popoloj batalantaj por sia nacia sendependeco kaj socia justeco. Ni bone scias, ke tiu solidaro ege gravas precipe en la socialisma mondparto ; sen ĝi oni ja ne povus sukcese daŭrigi la vojon de socialismo kaj paco.

Ankaŭ pri tio ni pensas, sendante fratajn salutojn al niaj amikoj eksterlande antaŭ la maja festo.

Estu la II-a kongreso digna okazo por elmontri nian apartenon al tiu ĉi komuna klopodado. /knl/

### OKAZE DE LA ZAMENHOFA DATREVENO
(+ 15.4.1917)

"Konante la historiajn leĝojn kaj la historion de la Esperanto-movado,ni povas konstati, ke la internacia kaj nacia Esperanto movado en la estinteco kiel ankaŭ en la estanteco respegulas la realajn sociajn fortojn kaj la fundamentajn politikajn ideojn de la koncerna historia epoko.

Esperanto kiel lingvo mem ne estas ideologio. Sed ĝi servas la koncernajn ideologiajn celojn de la parolanto. Pro tio ĉiu esperantisto reprezentas konkretan ideologion. La diversaj sociaj fortoj, ĉu tio estas konscia al esperantistoj aŭ ne, utiligis kaj utiligas Esperanton por siaj klaseceloj.

Per konstanta humanisma agado ni esperantistoj omaĝu la progreseman strebadon de D-ro L.L.Zamenhof kaj lian pacamon".

(Rudi Graetz en PACO, 1971, GDR-numero)

## Samideana kroniko

Forlasis niajn vicojn 19.1.72-jaraĝa s-ro Jaroslav J a n á k. Laste li funkciis kiel pedagogia gvidanto de ER en Jaroměř. Honoron al lia memoro !

Sian geedziĝon festis en Opava Ingrid kaj Vlastimil K o č v a r a. Ili akceptu nian sinceran gratulon !

NI PARDONPETAS s-inon A.Šumavanská kaj la legantojn pro la bedaŭrinda eraro en la lastnumera kroniko.Temis ĝuste pri la 80a vivjubileo,pro kiu ni postgratulas !

# Ĉeĥa klasikulo surscenigita en Esperanto

La 18an de februaro naskiĝis en Liberec io, kio povus esti nomita la nova ŝanco por la Esperanto-teatro en Ĉeĥoslovakio. Kaj tiun naskiĝon akompanis rid-eksplodoj de pli ol cent spektantoj, kiuj tiamaniere komentis esperantigitan humuraĵon KOMEDIO EN LAVTROGO de la ĉeĥa klasikulo Václav Kliment K l i c p e r a (1798 -1859) kiun prezentis la membroj de la tre populara "profesia" Studio Ipsilono" ĉe la Naiva Teatro en Liberec. La teatraĵon tradukis Ladislav Špína, la tekstojn de la kantoj Jiří Kořínek. Enkondukis la prezentadon Antonín Slanina.


Nun iu eble demandos pri la vorto "naiva". La aktoroj mem difinis la gvidprincipojn de sia arto : "K o lektiva kaj unuopula sin-amuzo, bazita sur naiva mond-observado kaj kun inklino al ludo en ties origina signifo". Verŝajne pro tio ne estas tute certe, kie regas pli granda humuro - ĉu inter la publiko aŭ sur la podio.

Oni ne forgesu, ke la liberecaj teatristoj, samkiel tiuj en Opava (rememoru Manon) neniam antaŭe lernis eĉ vorton Esperante. La tekstojn ili devis parkerigi dum kelkaj semajnoj, do por "digesti" la lingvaĵon la tempo estis relative malmulta.

Respektivaj eraroj ĉe la prezentado devus esti sekve rigardataj nur kiel detaloj - perditaj cetere kun siaspeca ĉarmo kaj superregitaj de la entuta etoso. Tiusence la persono (videbla ) de sufloristo (la tradukinto) estis racia inventaĵo, tre celkonforma.

Restas ankoraŭ aplaŭdi al la reĝisoro J.Schmid kaj al la geaktoroj K. Novák (mastro), J.Synková (Doronjo), J. Fučík (Joĉjo), P.Popelka (oficisto ) kaj L.Sobota (instruisto).

O.Knichal



Sur la bildo : K.Novák (dekstre) kiel mastro kaj J.Fučík kiel Joĉjo en la Esperanta surscenigo de "Komedio en lavtrogo".

## LA ĈEFDELEGITO INFORMAS

Mi atentigas niajn Individuajn Membrojn de UEA, ke iliaj aliĝoj de Delegitoj aŭ Fakdelegitoj aŭ adres-ŝanĝoj, kiujn mi sendis fine de 1971 aŭ komence de 1972 al C.O. en Rotterdam, ne povis jam esti envicigitaj en la Jarlibron 1972, 1-a parto, kiu dume estis finpresita. Ĝi do estos ebla nur en la Jarlibro 1973.

/Sv/

## Rondeta vivo

KRASLICE - Okazas denove regulaj kunvenoj de 8-10 anoj. Oni studas en ili la lingvon, praktikas ĝin dum diversaj ludoj, rakontas pri eksterlandaj vojaĝoj, aŭskultas diskojn, rigardas filmojn. Ĉiu kontribuas laŭ sia kapablo. La letero pri tio ne indikas la tempon de la kunvenoj. (ver)

OPAVA - La tradicia Zamenhofa vespero okazis 7.1.1972. Pri sia vojaĝo al Londono rakontis inĝ. Vlastimil Kočvara. La esperantistoj en Opava regule kunvenadas ĉiumarde je 18,30 horo.

OSTRAVA - La 8an de marto rekomenciĝis printempaj E-kursoj por komencantoj en la uzino VŽKG. Okaze de la II-a kongreso de ĈEA EK aranĝos ekspozicion sub la titolo "Dudek jaroj de la agado de esperantista rondeto en VŽKG.

ŠUMPERK - La konstitua kunveno de LG ĈEA okazis 25.1. Estis elektita la nova komitato kun J.V.Otta kiel prezidanto, E.Sittová vicprez., O.Müllerová sekr., F. Staněk kasisto, A.Thiel ekonomo, F.Kudr kaj V.Müller revizoroj. - Aliĝis al ĈEA ĉiuj novaj gekursanoj tiel ke la suma nombro de la asociaj membroj estas nun 40 !

# Seminario pri korespondaj kursoj

Ne ĉiu lernanto kapablas - pro la plej diversaj objektivaj aŭ subjektivaj kaŭzoj - vizitadi lecionojn persone. Por tiuj ekzistas aliaj instru-metodoj, ekzemple korespondaj /skribaj/ kursoj.

Pri tiu ĉi speco de klerigo inter esperantistoj okupiĝis la seminario kunvokita de la Pedagogia Sekcio de ĈEA /19.-20.2.1972/ en Liberec kun ĉeesto de 18 aktivaj membroj de PS kaj kvar gastoj el Pollando kaj GDR. La Asocion reprezentis O.Knichal. Nome de la Distrikta Kulturdomo salutis la kunsidon k-dino Hanková kaj en la nomo de EK Liberec ties prezidanto Ladislav Špína, kiu meritiĝis pri la organizo de la aranĝo.

La traktadon sperte gvidis la sekretario de PS ĈEA Karel Kraft. Li resumis la ĝisnunan aktivecon kaj prezentis ok specimenojn de skribaj kursoj jam ellaboritaj.

Estis akcentita la bezono kunordigi la agadon kaj labori komplekse. Per valoraj konsiloj kontribuis Mag. R.Tyblewski el Jelenia Góra, kiu rekomendis i.a.konsulti la kursojn eldonitajn en Pollando.

En la diskuto oni priparolis metodikan kaj teknikan flankojn de la problemo kaj elektis redakcian komisionon /prof.Hladík, Dro Hradil, Klement, Kraft, Pechoč, Pytloun, Slanina/. Kunlaboros Vuk Echtner, inĝ. E.Felix kaj Dro V. Novobilský. La komisiono decidos pri la definitiva formo de la tekstaro ; ĝi estos supozeble dividita laŭ 20 lecionoj kun maksimume 40 novaj vortradikoj en ĉiu parto.

Pliaj detaloj estos pritraktataj ĉe la IIa kongreso de ĈEA en Ostrava. /k/

---

**NIAN ENKETON** (vd.n-ron 7/71) partoprenis ĝis nun sole 38 (!) esperantistoj, el tio 6 eksterlandaj. Kolektive respondis EK Pardubice. La gazetenhavo kaj ĝia legiteco (la 1-a,2-a demandoj ) estas preskaŭ ekskluzive pozitivaj.Jese oni respondis ankaŭ je la uzado de E-o (la 5-a dem.), dume preskaŭ neniu kontribuis al ĈEA-organo (la 6-a dem.) Pri la gazet-titolo la starpunktoj diferencis.

La legantoj ŝatus pli multe legi precipe beletron, lingvokonsilojn, esperantologiaĵojn, vojaĝpriskribojn,eksterlandajn novaĵojn ks. (Forgesante,ke la gazeto estas unue la presorgano de la asocio kaj laŭ siaj ampleks-eblecoj ĝi devas servi grandparte kiel organiza informilo. Plej multe plaĉis la artikoloj: Rilato de la junularo al E-o ĉe ni de J. Adamec kaj Festo de la ĉeĥa-slovaka reciprokeco de O.Knichal ; laŭ la numeroj la plej bona estis 7/71,en kiu troviĝas ambaŭ artikoloj,tamen ankaŭ la enketo !

---

**LA DUAJ EKZAMENOJ DE PS ĈEA** kun partopreno de ok kandidatoj okazis 13.11.71 en Hanušovice,distr.Šumperk. Prezidis la ekzamenan komisionon inĝ. L. Krajíc.

**LABORO SUPER LA ĈEĤA-ESPERANTA TEKNIKA VORTARO** daŭre progresas. Laŭ la alvoko pri kunlaboro alvenis deko da aliĝoj,tamen fakuloj de ĉiuj teknik- kaj scienc-branĉoj estas plu serĉataj. Estis ligita ankaŭ kontakto kun D-ro Árpád Máthé el Budapeŝto, kiu entreprenas similan laboron en Hungario.

---

## Someraj aranĝoj eksterlande

**POLLANDO** La Internacia Esperantista Feriado "La Ora Pola Aŭtuno" en Międzygórze (18.9.-1.10.1972)

Tutpollanda Kongreso de Esperanto en Poznań (aprilo).

La 28-a Internacia Kongreso de TEJO en Toruń (16.-22.7.)

**HUNGARIO** La 10a Somera Esperanto-Universitato en Gyula (9.-15. 7.) sub la aŭspicio de UEA.La partoprenkotizo 1000 resp.700Ft-oj, depende de la loĝloko. Tiu ĉi historia ĝardenurbo kun siaj artobjektoj,strand-,kurac- kaj termalbanejoj garantias ankaŭ bonan ripozon.

# LERNI EL SIAJ PROPRAJ MANKOJ

Foje mi legis en iu gazeto entuziasmoplenan artikoleton pri diversnaciaj gejunuloj,kiuj ie en Balkano konstruis digon. La rakontado titolis trafe "Ni konstruas la digon - la digo konstruas nin". La alegoria senco de tiu slogano revenis al mi, kiam mi netskribis laborplanon de la Pedagogia sekcio por tiu ĉi jaro. Kiam mi kolektis ĉiujn proponojn kaj atentigojn kaj rericevis ĝian skeleton de la prezidanto, mi subite ekkomprenis, ke eĉ la plej preciza nombrado de niaj taskoj ne donos al nia anaro la ĝustan imagon pri la fortoj,klopodoj, sinoferoj, esperoj, kiuj obligis la kreon de tiu ĉi plano.

Jes, la plano nur pale rebrilas klopodojn kaj atingojn de unuopuloj aŭ grupetoj, perditaj kun sia formika laboro kiel insuletoj en vasta oceano. Ĉu ni povas racie, sen galimatioj konstrui nian digon, ne konsiliĝante kaj informiĝante adekvate? Kaj de kie aŭ de kiu povas nia anaro informiĝi ? Dum unu-dufoje en la jaro okazanta kaj galope traktanta kunveno, aŭ en maldika cirkulero ?

La leteroj de niaj anoj pruvas neinformitecon pri la reala situacio. Estas efektivigata paralela laboro, estas efektivigata vana laboro. Prezentiĝas nerealaj proponoj. Ripetiĝas konataj aferoj. Kiel sekretario mi havas certan avantaĝon,kolektante en miaj manoj multajn voĉojn. Mi tial asertas plenrespondece, ke nia membraro posedas valorajn trezorojn, kiujn ni, la estraro, plejparte malatentas...

Pravas nia ano, kiu al mi riproĉas, ke mi ne sendis aliĝilon al Tomáš Fuk, ke mi ne invitis V.Z.,ke mi ne bone aŭ ne ĝustatempe informis pri IO NOVA. Kulpas mi,ĉar mi surŝultrigis pli ol mi kapablas plenumi, kulpas mi, ĉar mi ne scias konvinki kelkajn anojn pri neceso de firma organiza bazo. Ĉi tiuj liniojn mi skribas por serioze atentigi pri la neceso denove trakti la dividon de la respondeco.

Daŭrigante nian laboron ni povis dum la novembra konferenco konstati kreskon de la respondeco, laŭkvalitan ŝanĝon ofte eĉ de kontraŭaj starpunktoj kaj - espereble mi ne troigas - plialtniveligon de la homaj rilatoj inter ni. Ne okazis kunveno, kie ni ne ridus. D-ro Černý notis : ŝvitante kaj ridante ni forkurigas malsanojn elegante. Kompreneble ŝvitante pro laboro.

Ne ĉiam pleniĝas nin sentoj de bona sanstato, ne ĉiam ni inklinas ŝerci. Iam pleniĝas nin sentoj de dubo kaj vaneco. La plej efika kuracilo estas kresko de nia societa vivo. Jam ne enfermiĝanta kaj vualiĝanta per misteraj sonoj, sed intense serĉanta kontaktojn kun la "neverda" mondo.

Jes, firme,kuraĝe,neflankiĝante. Perdante kelkajn ŝancojn ni restartas por novaj celoj, novaj idealoj. Cent startoj perdiĝas, mil startoj perdiĝas, ni startas kaj startas konstante... Iom da ironio ne malutilas - ĝi male helpas transponti la fendegon inter la febraj ambicioj por noblaj idealoj kaj la ofte kruda, surdmuta realo.

Inter ĉi tiuj du ekstremoj moviĝas nia animo kaj mi nun demandas min : ĉu ni similas al la digo-konstruantoj, kiujn la digo mem konstruas, hardigante ilin ? Ĉu ni apartenas al ili, aŭ ĉu ni estas nur ŝvitantaj spituloj, kiuj timeme "muntas" siajn digetojn ?

Tie ni serĉu la kaŭzojn de niaj malvenkoj. Ne tiom en la ekstera, plejparte indiferenta mondo, sed en niaj propraj eraroj kaj mankoj. Tion unuavice. Kaj pluavice : ni eduku nin mem. Ni kunlabore konstruu firman organizan bazon. Cento da membroj estas multe, se ĉiu el ili almetas sian brikon.

Jen la bazo de nia plua kunlaboro.

Tion mi preferis diri anstataŭ prezenti al vi nian laborplanon. Ĝian kompleton mi disponigos al ĉiu nia ano, kiu skribe postulos ĝin de mi kaj promesos sian kunlaboron.

Karel K r a f t, Obořiště 107, Příbram

---

II-an JUNULARAN SEMINARION aranĝis inter 14.-16.4.1972 Loka grupo de ĈEA en Liberec kaj EK en Jablonec n.Nisou. La entrepreno estis destinita por la gejunuloj 15-30 jaraĝaj kaj ĝi okazis en la hotelo Černá louže en Polesí ĉe Rynoltice ( direkto : Jablonné en Podještědí).

**SIGNALILO**

**FERVOJISTA SEKCIO DE ĈEA**

Jarkunveno de la sekcio okazis la 4an de decembro pasintjara en Praha. Eleksterlande vizitis ĝin Otto Walder el Svislando, estrarano de IFEF. Pluaj eksterlandaj gastoj ne povis esti invititaj pro organizaj kaŭzoj.

La kunsido pritraktis la agadon de la sekcio en la pasinta jaro, starigis laborplanon kaj elektis la novan komitaton. Kiel prezidanto de FS ĈEA estis elektita s-ro Jiří P i š t o r a, vicprezidanto František J i n d r a, sekretario František M a r k l, ĉiuj el Česká Třebová; kasistino Svatava H e l m e c z y o v á el Praha kaj sekcia redaktoro fariĝis Josef S l e z á k el Č.Třebová.

Posttagmeze la ĉeestantoj trarigardis la Pragan kastelon kun apudaj antikvaj konstruaĵoj sub la sperta gvido de s-ino D.Vybíralová.

KOMISIONO POR EKSTERLANDAJ EKSKURSOJ proponas al fervojistoj :

- 4tagan viziton al Pollando /Vroclavo,Varsovio/ fine de majo.Prezo ankoraŭ ne difinita.
- 14tagan restadon en ĉarma loko apud la Nigra Maro en Bulgario/kune kun la fervojistoj el la stacidomo Most/. Tranoktado rezervita en kabanoj kaj privataj hejmoj. La elspezoj : 1400 Kčs sen poŝmono.
- 4tagan ekskurson aŭtune al GDR kun vizito al Dresdeno,Berlino kaj Lepsiko /Leipzig/. Prezo ankoraŭ ne fiksita.

Ĉiuj interesitoj t u j aliĝu ĉe Josef Svoboda,ul.K.Biebla, n-ro 2313/44, Most.

BONAN PORESPERANTAN LABORON faris ER "Amikeco" en Česká Třebová,kiu la 12an de januaro aranĝis jam la trian Esperanto-balon. Ĝin partoprenis la gekolegoj el Plzeň, Praha, Poděbrady, Pardubice, Choceň,Kojetín,Šumperk, Lanškroun, Svitavy, Přerov, Olomouc. Enkadre de la balo oni realigis la unuan renkontiĝon kun 24 rondetanoj el Klodsko/Pollando/,ĉe kiu bedaŭrinde mankis reprezentanto de Ĉeña Esperanto-Asocio ĉiam regule invitata.

---

Fervoja terminaro aperis en Nederlando

La plej juna frato de la okcidentgermana unuenaskito estas samtempe la plej granda : "Spoowegfakwoordenboek" ĝi nomiĝas kaj fiere viciĝas kun siaj 138 paĝoj A-4-formataj en oficiala NS-kovrilo apud "Ordbok for Jernbaneuttryk" el Norvegio, "Mala železnička terminologia" el Jugoslavio, "Kleines Eisenbahn-Fachwörterbuch" el FRG kaj Vasúti kisszótár" el Hungario. Ĉiuj baziĝas sur la komuna fonto kaj volas oferti al la uzantoj ne tro grandan stokon da terminoj, kiuj ebligu al ili sin esprimi en fervojfaka medio.

LA NORVEGA ESPERANTO-FILMO. La pruntedonon de kopioj de la filmo kun E-parolo "Mi estis tie", eldonita de la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj,prizorgas Norvega Esperantista Ligo, Box 942, Oslo 1, Norvegio.

ĈU VI JAM ABONIS "Internacian Fervojiston",organon de IFEF ? Aliĝu aŭ petu informojn de J.Pištora,Nám.míru 1746, Č.Třebová.

# LINGVA KONSILANTO

Kvankam la libro de s-ro Wiliam Auld PAŜOJ AL PLENA POSEDO estas bonega, tamen ankaŭ en ĝi troviĝas kelkaj eraroj aŭ "neologismoj" , kun kiuj ne ĉiu esperantisto povas konsenti.

Ekzemple : b e n z i n u l o (pĝ.8) anstataŭ benzinvendisto aŭ benzinstaciestro (PIV) Ĉu benzino estas ia "eco" ? Tute ne karakteriza por vendisto !

B a g o (pĝ.211) - neologismo - ĉu ne sufiĉus v a l i z o? R e p r o d o (pĝ. 212) = onidire mallongigo de "reproduktaĵo" ! T r a n k v i (pĝ.212) = trankviliĝi !?

Ĉu estas utila por Esperanto skribi en mallongigoj ? Ĉu tio estas laŭfundamenta? Se ni zorgas pri la pureco de la Internacia Lingvo, ni devas montri erarojn, eĉ se ili troviĝas en la eminenta verko.

Václav Pechoč

---

RICEVITAJ PUBLIKAĴOJ

● LA HORLOĜISTO DE DJEN BJEN FU. Elektitaj vjetnamaj noveloj de la periodo inter 1945-1964. Eldonis Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1971, 413 pĝ.

● RESUMO PRI VJETNAMIO. Tre utila manlibro pri la historio, ekonomio,kulturo kaj ekstera politiko de tiu ĉi lando. Eld. Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1971 , 123 pĝ.

● ANEKDOTOJ DE VOJAĜO aŭ Prezidento Ho Chi Minh rakontas... (de T.Lan).La unua legaĵo veninta de VPEA-eldonejo en Hanojo. 96 pĝ. Tradukis Pham Dinh Dien.

---

ALVOKO POR KUNLABORO. La Esperantista Klubo ĉe la Domo de Instruistoj en Pazardĵik, Bulgario, proponis al PS ĈEA interŝanĝon de turismaj vizitoj aŭ reciprokajn vizitojn de artismaj grupoj(neesperantistaj). Oni pretas kunlabori ankaŭ en aliaj sferoj kun la celo fondi klubojn de ĉeĥa - bulgara amikeco. Interesitoj bv. kontakti : Domo de Instruistoj,str.2.Janúaro,n-ro 2, Pazardĵik.

ORIENTSLOVAKA TERITORIA KOMISIONO EKFUNKCIIS. Koran saluton nome de kvindek esperantistoj, kiuj renkontiĝis okaze de la kluba kaj teritoria kunvenoj en Košice, sendis al ĈEA la prez. de TK D.Papák, vicprezidantoj Dro A.Lukáš, M.Furman, sekr. H.Krejčíková. Laboradreso estas identa kun tiu de la klubo. Sekvas subskriboj de 16 ĉeestintoj.

---

BABELA TURO EN BRUSELO. Nun estas ok oficialaj lingvoj en la Eŭropa Ekonomia Komunumo. Por la Eŭropo-universitato fondita en 1971, estonta en Firenze oni fiksis provizore 5 oficialajn lingvojn. Tio signifas kontraŭregularan diskriminadon de la dana,norvega kaj irlanda lingvoj. Tamen por funkciigo de universitato jam kvin lingvoj estas tro. Ni kredas, ke la nesolvita lingva problemo de universitatto detruos ĝian ŝancon esti frekventata de multaj.

(laŭ Interlingvistika Informa Servo,1/72)

● CIGANA ROMANCARO de la fama hispana poeto Federico García Lorca. Trad. Fernando de Diego. Eld. STAFETO,1971,110pĝ.

● INVIT'AL JAPANESKO de Miyamoto Masao kun antaŭparolo de W.Auld. Eld. STAFETO 1971, 110 pĝ.

● LEKSIKONO DE OFICIALAJ VORTOJ ( baza Esp.-angla vortaro) de E.Ockey, 20. pĝ. Havebla interŝanĝe ĉe la aŭtoro (15 Upper Pines,Banstead, Surrey, Britio).

M E N D U ~~Ĝ E~~ ĈEA :

SENĜENAJ DIALOGOJ de A.Fernández, FABELOJ de H.Ch.Andersen (trad.L.L.Zamenhof), KUŜANTA TIGRO de L.Promet, estona verkistino, GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO de K.Kalocsay,P.Balkányi,H. Vatré, LA SEP REĜIDOJ de Béla Balázs.

---

A t e n t i g o ! Pro dumonata foresto de la redaktoro alilande la venonta numero de STARTO (duobla) aperos nur fine de junio - plejparte kun kongresaj materialoj.

# Korespondi deziras

SOVETIO - Asriel KUTASOV, 34j.inĝ.,Vilnius-232006, Statibininku str.8-27 • Por siaj gekursanoj 16-20j. serĉas kontakton A. RAMONAS 32j.elektroteknikisto, 235030 Kedainiai p.k.15 • Grupo de lernantoj 13-16j. - Esperanto,Gogolio 3, Kaunas (ĉiuj Litova SSR) • Ludmila FETISOVA, p.k. 140, Taŝkento-5 kaj Nina NIKIŜINA, Manĵara str.137,n.40, Taŝkento-105, Uzbeka SSR • Ülo RAASMAN, 203053,p.k.55, Keila, Estona SSR.

HUNGARIO - Aleksandro KELEMEN kun sia edzino, Vadász str.8,Szeged. Kun fervojistoj el Praha. • Ben ZSOLDOS,Szentkirályi u.6,I.21, Budapest VIII. Pri la E-movado • Dániel MÓZES, instruisto en pensio, Mocsa • Károly SZAMOSFALVI,19j, popolarto, lingvoj • Mária LESKU,lernantino de 5a klaso, Komló, Sportvölgy 9 • Rudi SÁNDOR, Kenyesi, Vasmegye.

BULGARIO - Ligu kontaktojn kun gestudentoj el Sviŝtov,kies komuna adr.estas: Bojan CONEV, Esperanto Domo,Stara Planina 19 • Boris ANGELOV, instruisto, Smoljan,blok 19,ap.14 (celas gastigi k gasti)

POLLANDO - Wojciech SZCZAKOWSKI,41j.instruisto kaj radioteknikisto, Lodž 11,ul. Mokra 23m 59

G D R - Hans JAHN, 6421 Reichmannsdorf, Geb.- Weg 3

F R G - Wilhelm SCHUH, 463, Bochum, Dorstener str.145a • Gerhard WAGNER, 61j.ĉefpordisto, 7145, Markgröningen,Stelzengasse 6 ; historio de ĈSR,folkloro •

FRANCIO - Regine BENETTI, 21j.stud.82, rue Jaubert 13-Marseille (5°) kun esp. en ĈSR • Louis BOUZON, 45j.direktoro de malsanulejo, Hôpital, 61 de l´Aigle ; interŝ.koleopterojn.

BELGIO - Dro J.MUYS, Boomstraat 30,2680 -Bornem, Flandrio. Pri lingvistiko(ankaŭ slava),naciecaj minoritatoj • Toaquim Alberto RIBEIRO da Costa 23j.portug.studento, Placet Centrum 6, Mechelsevest 3000 Lovanio ; filozofio,klasika muziko.

ITALIO - Fedoro ORLANDINI, Via Borzini 4, 12 084, Mondovi (Cuneo).

BRITIO - Andrew MARSHALL,18j.muzikisto, 193, East Common Lane, Scunthorpe, Lincolnshire DN 16 1 M L.

HISPANIO - Francisco RUEDA, Ancha 14, Jaen. Librojn,b.k.,spec.kuirreceptojn kun virinoj.

JAPANIO - Jamasaki MOTOHIRO, 28j. universitata docento,matematikisto, 4-403 Sinsyu-daigaku Syukusya, 1709-5, Wakasato Minami-iti, Nagano-si 380 ; interŝ. p. m. kaj kol.b.k.

BRAZILO - Eber PACHECO Barbosa, juna fizikisto, Rua Quintiliano Silva, 280 30 000 - Belo Horizonte, interŝ.spertojn en stud. kaj instruado pri fiziko kaj fakan literaturon. • F-inoj Helena PUGAS kaj Eliana PUGAS,Paraíso 34 ap.302-Bl.B, 40 000 Salvador Ba. • Maximino BUGARIN, Visc.Rio Branco 27, 40 000 Salvador - Ba

Ĉ S S R - P.m.,glumarkojn ks. je esp. temoj kompensos Vlad. BREJNÍK,str. Dvouletka 679 Libochovice • Jaroslav ŠTEFEK, Kolín II, Nad Zastávkou 113,kun abstinenculoj k pri neŭtraleco • Marcela HANZLOVÁ, Trocnovská 739/24, Havl. Brod. Por E-geamikoj koresp.per b.k. • Studentino petas kontribuojn por disertacio je la temo : metodiko certigi plej konvenan funkcikapablon de elektraj k motoraj lokomotivoj. Skribu ĝis 30.9.72 al: Eva CHVOSTOVÁ, Engelsova 289,Poděbrady .

---

TUTMONDAN FOTOEKSPOZICION sub la titolo "Monumentoj de la rusaj kaj sovetaj homoj eksterlande" organizas E-klubo en Barnaul,Sovetio. Oni traduku respektivajn surmonumentajn skribaĵojn kaj koncize priskribu la estiĝon de la monumento. - La plej bonaj fotoj estos premiitaj ! Sendaĵojn direktu al : V.Romanov,EK p.k. 40, Barnaul-99, Siberio, USSR .

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio,p.k.8,Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare. Respondeca redaktoro Oldřich K n í ch a l. Redakta komitato : inĝ. Eduard Felix, Jaroslav Mařík, inĝ. František Sviták. Abonebla sole por la membroj de ĈEA. - Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ŘP Praha j.zn.P/1 - 2283/1971, dne 6.5.1971.

---